

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlingo Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pollando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271.

RUD. HROMADA:

## L O C A R N O

En la februara numero ni esprimis la esperon, ke la paskaj kunsidoj en Locarno trovos tempon por fari la necesajn interkonsentojn pri komuna kunlaborado de la naciaj societoj. Hodiaŭ ni povas reporti, ke ni estas kontentaj. La afero de regularo de K. R. estis solvita en unu sola horo, oni kontentigis la francajn kaj polajn samideanojn aldoninte iujn partojn de ilia propono al la teksto oficiala. Tiel restis la tri kunsidoj por la vera celo de nia kunesto, kaj se ni kalkulas la debatojn apud manĝotabloj, en ekskurso-trajno kaj ŝipo, la reprezentantoj de la 16 naciaj societoj povis intertrakti ĝis laciĝo.

Sola mi forveturis el Praha, sed jam en Linz mi rekontis S-ron Balkanyi el Budapest, sur svisa landlimo Steiner el Wien, en Zürich D-ron Dieterle el Lipzig. Nian kvaron akceptis en Locarna stacio Privat, Jakob, Kreuz, Ĉe kaj direktoro Gilà, Locarnano, kiu devis venki multajn malfacilaĵojn por loĝigi nin en tagoj, kiam Locarno estas plena de turistoj. El Parizo Rollet de l'Isle kaj Dubois, el Belgio Schoofs, red. de Belga Esp., el Germanio ankoraŭ Ellersiek, red. de la Germana Esp. kaj al ĉiuj konata eldonisto, Italo Inĝ. Stroboli, Jugoslavo Rotkoviĉ, red. de Konkordo el Zagreb, Murario el Bukureŝti, Sviso Stroele, recenziisto de Esperanto, Aeltermann el Danzig, urbo da la XIX.-a, S-ino Blicher kaj S-ro Hinriksson por danaj samideanoj, Dalmaŭ, por katalunoj kaj el nia lando, por Germana Ligo, ĝia prezidanto Inĝ. Scholze, krom pluraj aliaj personoj kolektiĝis en hoteloj kaj pensionoj de Locarno, sur kiuj gaje en printempa aero flirtis esperantaj flagoj.

Estis ĉ. kvardek punktoj traktitaj, pri pluraj el ili nia publiko legos en Esperanto. Kelkaj ne estos publikaj antaŭ realigo de la planoj. Sed ĉefa tendenco estis akceptita de ĉiuj reprezentantoj ĉeestintaj: en la venontaj monatoj entrepreni eble ne multe, sed samenergie en ĉiuj landoj. Se ekzemple regulaj statistikoj venas al Centra Komitato el du tri landoj, ili ricevas plenan utiligon nur, se el ĉiuj aliaj landoj simile ciferoj venas. Se Komerca adreso voĉdonita de kelkaj kunvenoj estas starigita sole en unu du landoj, tiam ĉiuj aliaj landoj estas kulpaj pri mortigo de bona ideo. Se Centro en Genevo ne ricevas regule precizajn informojn pri la

stato kaj progresado de la movado en ĉiuj landoj, kiel ĝi povis liveri fidindajn informojn en la momento, kiam ekz. oficialaj aŭtoritatoj de unu lando ilin postulis? I. C. K. en Genevo estas preta aranĝi ekspozician materialon kun grafikoj, tabeloj ktp., kiu estus pruteprenebla aŭ aĉetota de naciaj societoj aŭ de kluboj. Tio nur tiam povas sukcesi, se ICK el ĉiu lando ricevas la dokumentojn. Samtempaj fakaj kursoj en ĉiuj landoj liveros rezultatojn nur, se ili estas aranĝataj efektive en ĉiuj landoj. Gravaj entreprenoj de literatura biblioteko aŭ de teknika gazeto povas sukcesi, se en ĉiu lando la naciaj societoj vaste diskonigos kaj subtenos ilin.

Ĉio ĉi estas aferoj tute klaraj, ĉu ne? Sed tamen en la praktiko oni vidas, ke ili ne estis sufiĉe komprenataj. El tiaj spertoj rezultis la vortoj, ke niaj progresoj iras pli rapide ol ni povas sekvi. E-efektive esperanto neniam faris tiajn seriozajn progresojn sur la kampo de praktika vivo kiel en la jaroj postmilitaj. Sed bedaŭrinde multaj bonaj okazoj restis ne uzitaj aŭ sole parte utiligitaj. Malmultaj estas la laborantoj inter ni. Kaj eĉ tiuj splitas siajn fortojn unue per tio ke ili laboras dise, ne rekonnante la neceson de interkonsentita laboro gvidata de centro, due per tio, ke ili dediĉas siajn fortojn al aferoj malpli gravaj, aŭ almenaŭ malpli urĝaj.

Estas ja tiom da diversaj — ismoj al kiuj niaj samideanoj sentas sin devigataj helpi!

Se notindaj sukcesoj estis atingitaj en la nuna stato de nia movado, stato, kiu ne povas esti nomata ideala el vidpunkto de ekonomia kunigo de la fortoj, kiajn rezultojn ni atingos, se ni laboros laŭplane, racie, sisteme!

La diskutoj de Locarno montris, ke estas ĝenerala la deziro al tia racia, konkreta laboro.

Nun temas pri tio, ke ankaŭ ĉiu unuopa esperanto-laboranto estu ĝisfunde konvinkita pri tio. Ne estu prava tiu kiu diris: La plej granda malhelpo de la progreso de nia movado estas la esperantistoj mem. Aserto certe iom ofenda en sia absurdeco. Sed pripensu: Kontraŭ malamiko oni povas sin aranĝi, sed kion fari kun la sambatalanoj, kiuj lasas vin en embaraso ĝuste en la momento, kiam vi urĝe bezonas ilian kunlaboron, respondon, informon ktp. . . ?

## LITERATURO

KAREL ČAPEK:

### EDINBURGH

El la „Anglaj leteroj“ trad. H. Taussig (Praha).

Kaj nun al la nordo, al la nordo! Graf-landoj pasas unu post la alia, en iu bovinoj kuŝas, en alia ili staras, ie sin paŝtas ŝafoj, alie ĉevaloj kaj alie sole kornikoj. Aperas griza maro, rokoj kaj marĉoj, malaperas arbustaj bariloj kaj anstataŭ ili venas ŝtonaj muretoj. Ŝtonmuretoj, ŝtonvilaĝoj, ŝtonurboj; trans la rivero Tweed estas ŝtona lando.

Mr. Bone estis preskaŭ prava deklarinte Edinburgon la plej bela urbo en la mondo. Ĝi estas bela, ŝtona, griza kaj stranga; kie alirube fluas rivero, tie ĉi kuras fervojo, sur unu flanko estas la malnova urbo, sur la alia la nova, la stratoj estas larĝaj kiel nenie, en ĉiu perspektivo statuo aŭ preĝejo; kaj en la malnova urbo treege altaj domoj, kio estas nenie en Anglujo, kaj tolaĵo sur stangetoj flagranta super stratoj kiel flagoj de ĉiuj nacioj — tio ankaŭ ne estas sube en Anglujo, kaj malpuraj, ruĝharaj infanoj sur la stratoj, tio ankaŭ ne estas sube en Anglujo; kaj forĝistoj, meblistoj kaj diversaj bonhomoj, tio ankaŭ ne estas en Anglujo, kaj strangaj stratetoj, *wynds* aŭ *closes*, tio ankaŭ ne estas en Anglujo, kaj dikaj taŭzaj maljunulinoj, tio ankaŭ ne estas en Anglujo; tie ĉi ree aperas la popolo kiel en Napoli aŭ ĉe ni. Tio estas al vi stranga: ĉi tie la malnovaj domoj havas fumtubojn en sia fronto, kvazaŭ anstataŭ turoj. Tio ekzistas nenie en la mondo, sole en Edinburgo.

Kaj la urbo kuŝas sur montetoj; vi rapidas ien kaj subite vi havas sub la piedoj profundan verdan abismon kun bela rivero malsupre; vi iras kaj subite kuras super via kapo alia strato sur ponto, kiel en Genova! vi iras, kaj vi venas sur precize rondan placon, kiel en Parizo. Vi ĉiam havas ion por miri.

Vi eniras en Parlamenton, kaj tie kuras aroj da advokatoj en peruketoj kun paro da vostetoj malantaŭe, kiel antaŭ kelkaj jarcentoj. Vi rapidas vidi la kastelon, kiu tiel pentrinde staras sur abrupta roko, kaj vi renkontas kapelon de sakfajfistoj kaj kompanion de Highlanders, soldatoj el la montaro; tiuj ĉi havas jupon el kvadratitaj plejdoj kaj ĉapojn kun rubandetoj, sed la sak-

fajfistoj havas jupetojn ruĝajn kaj nigrajn, kaj sur ili iajn saketojn el kapra ledto, kaj ili sakfajfas kapretreman kaj ekscitan kanton, akompanataj de la tuta kapelo de tamburistoj. Frapiloj flugas super la kapoj de la tamburistoj, dancas, saltas en stranga kaj sovaĝula danco; kaj la sakfajfistoj fajfas militkanton kaj marŝas sur la kastela parada placo kun nudaj genuoj per etaj paŝetoj de baletistinoj. Kaj *bum* kaj *bum*, la frapiloj dancas, turniĝas pli rapide, intermikse, alten, kaj jen funebra marŝo rezultas el tio, la sakfajfistoj fajfas senfinan, malrapidan melodion. La montaranoj staras senmove, post ili la kastelo de la skotaj reĝoj, kaj ankoraŭ pli post ili la sanga kaj terura historio de tiu ĉi lando. Kaj *bum* kaj *bum*, la frapiloj dancas super la kapoj sovaĝan kaj artan dancon — tie ĉi la muziko ankoraŭ restis spektaklo kiel en la pratempo; kaj la sakfajfistoj paŝante levetas sin, kvazaŭ ili en virĉevala senpacienco dancus al batalo.

Alia lando kaj aliaj homoj. Ĝi estas provinco, sed monumenta; lando malpli riĉa, sed vigla; brunruĝa kaj kruda tipo de homoj, sed knabinoj estas pli belaj ol sube en Anglujo, belaj nazmukaj infanoj, vivmaniero vasta kaj vireca spite la kalvinismo. Je mia animo! tie ĉi bone ekplaĉis al mi; do pro tiu ĝojo mi donos al vi plie peceton de la maro apud *Leith* kaj *Newhaven*, la malvarma kaj ŝtala maro, kaj kiel memorajon blujajn konkojn kaj saluton de fiŝistaj ŝipetoj; kaj ankoraŭ mi aldonos al vi la antikvan kaj pentrindan urbeton *Stirling* kun kastelo de la skotaj reĝoj; starante apud malnova kanono sur remparo de la kastelo, vi havas en la manoj ŝlosilon por la skota montaro; nu, ĉu ni vizitu ĝin?

### LASTHORE.

#### Esperanto-klara lingvo telegrafa en Ĉeĥoslovakio!

La ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj, per sia letero de 8. Aprilo. ĵus alveninta, informas nin ke ĝi plenumas la peton de nia Asocio kaj allasas esperanton, kiel klaran lingvon en la enlanda telegrafado, *depost la 15. Aprilo 1926.*

En la internaciaj rilatoj esperanto estos klara lingvo, laŭ la decido de Pariza konferenco de Telegrafa Unio, *depost la 1. Novembro 1926.*

Ĉs. Asocio Esperantista.

## ESPERANTISTA MOVADO

(La XVIII. kongreso en Edinburgo) okazonta de 31. Julio ĝis 7. Aŭgusto, resp. ĝia LKK dissendis 3an n-ron de Bulteno. Laŭ ĝi aliĝis ĝis 22. Marto 309 p., inter ili: 98 Skotoj, 130 Angloj, 23 Germanoj, 6 Francoj, 5 Poloj, 6 Nederlandanoj, 3 Aŭstroj, 1 Ĉeĥoslovako, 3 Kimroj, po 2 Italoj, Japanoj, Svisoj, Hispanoj, 4 Usonanoj, 1 Jugoslavo.

Ni sciigas tie ankaŭ *prezojn*: Tarifo A: Lito kun matenmanĝo en privata domo, pensiono aŭ hotelo: po 5 ĝis 15 ŝilingoj tage (40, 50, 60 Kĉ...) Tarifo B: Lito, matenmanĝo kaj vespermanĝo en granda pensiono, aparte rekomendata de LKK: po 9 aŭ 11 ŝil. por ĉiu tago (70—90 Kĉ). Bedaŭrinde la taga budĝeto ne povas esti farita, ĉar mankas prezoj de tagmeza manĝo.

De bona amiko el London ni ricevis jenan *budgeton* por ĉs. kongresonto: Vojaĝo III. kl. Praha—London—Praha 7, 10, — (Kĉ 1200), dutaga restado en London po 15 ŝ. (Kĉ 240 ambaŭ tagoj), vojaĝo London—Edinburg—London 3, 1, 3 (Kĉ 500), sep tagoj en Edinburgo, lito kaj matenmanĝo po 7 ŝ. 10 (Kĉ 60), sume Kĉ 420, sep tagmanĝoj kaj vespermanĝoj po 6 ŝ. (50 Kĉ), sume 350 Kĉ, trinkmono sume 7½ ŝ. (Kĉ 60), diversaj elspezoj 2, 5, — (Kĉ 370), kongreskotizo 160 Kĉ. La tuta sumo 21 funtoj t. e. cca 3.300 Kĉ. Al tio vizkostoj, kaj elspezoj survoje el kaj al Praha.

Laŭ la cirkulero ricevita de The Esperanto Institute Ltd. la kosto de la vojaĝo, pri kiu ni skribis en la lasta n-ro (2.400 Kĉ) enhavas ankaŭ la manĝon.

(*Internacia Mondliteraturo*) eldonata de Fmo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig kaj redaktata de D-ro Joh. Dietterle baldaŭ entenos 20 volumojn. Prezo po volumo RM 1.60 (Kĉ 13.—). Novaĵo estas, ke kvin volumoj laŭ libera elekto kostas sole RM 6.— (Kĉ 48 anst. 65.—).

(*Tutmonda biblioteko*) de Mosse aperigos ĝis fino de 1926 la unuajn 20 volumojn, ĉiu 64 p., po 40 pfenigoj (Kĉ 3.20). La unua volumo aperos en majo. Oni ne plu devas aboni 50 volumojn, sed sole 10. Tiel por negranda sumo de 32 Kĉ niaj legantoj povas havi kolekton de dek volumoj, de tre valora enhavo kaj de tre plaĉa eksteraja.

(*Enciklopedia Vortaro de Wüster*), tria parto, aperos la 15. Majo. La favora prezo de RM 12 valoros sole ĝis tiu dato (Kĉ 96 anst. Kĉ 120). La 4. parto estas en preparo. Antaŭ ĝi aperos de Wüster „Zamenhof-Radikaro“, je kiu ni vere ĝojas.

(*Fakaj revuoj*) estis ĉiam malfacila problemo de nia movado. En la lasta tempo aperis du revuoj, indaj de ĉies atento. Unue pro la treege interesa enhavo kaj due pro la plaĉa aspekto, kiu ja havas ankaŭ propagandan valoron: La unua estas Internacia *Medicina Revuo*, oficiala organo de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Redaktas ĝin D-ro Vanverts kaj administras D-ro Briquet, ambaŭ en Lille (Franc.). Multaj diversnaciaj kunlaborantoj (i. ili D-ro Ullman, Praha). — Internacia *Radio Revuo*, redaktata de D-ro P. Corret (Parizo) kaj eldonata de Fmo Et. Chiron enhavas tre interesajn artikolojn kaj ni dediĉas al ĝi ĉehl. atentigon.

## Tra la gazetaro

**Bulgara Esperantisto**, organo de Bulgara Esperantista Societo, aperas nun nur en esp-o, kaj enhavas plejparte tradukojn en la bulgara literaturo. La lastaj n-roj estas eĉ ilustritaj. — Por preparata verda semajno 16000 propagandafiŝoj estis presitaj. — Ministerio de instruado nomis lektoron de esp-o en Blindula Instituto de Sofia.

**Germana Esperantisto** N-ro 1. (Jan.) alportas ampleksan artikolon (germanan) pri la stato de esperanto-movado tutmonda en 1925. Laŭ statistiko de Gazetara servo dum 1925 aperis 3071 notizoj en 366 gazetoj de 155 lokoj. La statistika servo kontrolas 564 gazetojn, do sole 198 el ili tute nenion skribis pri esp-o. — En Bibliografio ni legas pri Jarlibro 1925 de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj, (82 p. 5 Kĉ), kiu enhavas i. a. adresojn de pli ol 2200 geinstruistoj esperantistaj, ordigatajn laŭ landoj. — En la rubriko La instruanto estas publikigata Esperanto-Korrespondenz-Lexikon für Kaufleute von Max Butin kaj Friedrich Jahn. La verko estas tre ampleksa, la citata n-ro enhavas 26. daŭrigon (aussprechen — ausstechen).

**Munkáskultura** (Laborista Kulturo) estas hungarlingva gazeto de Laboristaj kulturunuigoj de Hungario, aperanta en Budapeŝt kaj alportanta esperantaj kolonojn de Hungara E. Soc. Laborista. Ĝia aprila n-ro enhavas sur du paĝoj jarajn raportojn de HESL pri 1925. Malofte ni legis tiel detalan kaj precizan informon pri iu esperanto-organizaĵo. Sed ne nur la formala flanko vekis nian intereson. Ankaŭ la enhavo mem. Dum t. n. burĝa movado en Hungario havas sole kelcent membrojn, tiu ĉi organizaĵo de laboristoj havas 1119 m. en 17 grupoj, el kiu la unua havas 146 m., la lasta 22 m., inter ili 18% virinoj. HESL havas 19 bibliotekojn kun 1309 libroj, kiuj estis uzitaj en 1298 okazoj. La ĉ. 100 propagandajn paroladojn partoprenis ĉ. 6000 p. Rondirantan ekspozician materialon oni uzis en 11 ekspozicioj, vizititaj de 4.500 p. En 11 gazetoj HESL publikigis 85 diversajn artikolojn. Estis forsenditaj 938 leteroj dum 1925. Kelkaj distriktestroj persekutis la societon. Estis malpermesitaj kelkaj kursoj kaj grupoj en tri lokoj, pri kio dufoje parolis en la hungara parlamento deputitino Kéthly. Per helpo de soc. dem. frakcio HESL ricevis subtenon 15.000.000 hk (7.500 Kĉ) de la urbo Budapeŝt.

## VĚSEM KLUBŮM!

Upozorňujeme veškeré členstvo, že Internacia scienca asocio esperantista se zreorganizovala; vzhledem k důležitosti propagandy ve vědeckých kruzích a vzhledem k nutnosti soustavné práce na odborných slovnících třeba uvítati novou aktivitu tohoto sdružení co nejradostněji. Proto prosíme, abyste doporučili těm z vašich členů, kteří mají zájem o vědy nebo o odbornou esp. terminologii, přihlásiti se za člena ISA. Členský příspěvek je 0.5 dolaru (= 17 Kĉ) a lze jej zaslati buď přímo poštovníku p. Cél. Rousseau, 4 Place de la République v Levallois-Peret (v dopise), nebo řed. naší Vědecké sekce p. dru St. Kamarytovi v Bratislavě, Tělocvičná 3 (žádejte složenku). Členové dostávají zdarma čtvrtletně vycházející Bulteno de I. S. A. Doporučujeme co nejdříve, aby kluby naše tento věstník předplatily pro spolkovou knihovnu. Ročně stojí 17 Kĉ.

## LINGVA FAKO

## PĚKĻAD 14. TEXTU

Doŝlo pouze 5 prací, ani jeden klub nevyhovĕl vyzvĕní: Panu V. Střihavkovi, Kladno, odmĕnou zaslĕáme: El la fino de la mondo, de estona verkisto Friedeberg Tuglas.

**Romantikuloj de la tekniko.** La homaj ĝojoj kaj malĝojoj neŝanĝiĝas, kaj tio, kio en ili ŝanĝiĝas<sup>1)</sup>, estas sole la formo, per kiu ili sin vidigas<sup>2)</sup>. La antaŭajna generaciojn ni rigardas proksimume tiel, kiel lernanto de la oka klaso<sup>3)</sup> tiun de la unua<sup>4)</sup>. Estis ja tiaj nepraktikaj romantikuloj, tiuj migrantaj kavaliroj kaj kantistoj, religiaj fervoruloj kaj la patriotaj libroamantoj, popolvekantoj de tipo de Mácha<sup>5)</sup> kaj revemuloj de la muziko kaj de la versoj -- homoj nepraktikaj, kiuj dediĉis parton de sia vivo, parton de siaj materialaj rimedoj kaj laboron por celo, kiu al ili alportis nenian proporcian utilon.

La hodiaŭaj homoj ŝajnas esti aliaj. Ili estas homoj ĝojantaj pro teknika aktiveco. Fotografa aparato<sup>6)</sup> anstataŭas paletan, radio muzikilojn, motorciklo piedvojaĝadon<sup>7)</sup>. La homa sopiro al la ĝojo manifestiĝas nuntempe aliforme ol antaŭ kvindek aŭ cent jaroj.

Sed eĉ la hodiaŭa generacio estas romantika. Se iu konstruas radioamatere jam kvaran aŭ kvinan radio-akceptilon kaj se li helpe de motoro venkas terenajn aŭ aerajn malfacilaĵojn -- ĉu li ne bezonas por tio ankaŭ tiom da romantika entuziasmo, kiel iu lia antaŭulo verkanta glorigan odon? Kaj se lia laboro sukcesis, li ankaŭ ĝojas pri ĝi kaj nebedaŭras la oferitan tempon, klopodon kaj monon, kvankam lia sola utilo ofte estas sole la ĝojo pro laboro. Ankaŭ nia generacio estas romantika. Sed la hodiaŭaj homoj estas -- romantikuloj de la tekniko.

## 15. TEXT K PĚKĻADU.

**Ĉlovĕk a bŭh.** Rabbi Samuel ben Susartaj pŕiŝel do Řĭma. Naŝel tam ŝperk, jeŝ ztratila krĕlova. Tato dala v celĕ zemi vyhlĕsiti, ŝe odmĕni bohatĕ toho, kdo ji ŝperk do třĕceti dnŭ pŕĭnese, kdo vŝak jej pŕĭnese po tĕto lhŭtĕ, ten pŕĭjde o hlavu. Susartaj vŝak pŕes to vrĕtil ŝperk aŝ po třĕciti dnech. „Nebyl's as v tĕto zemi“, pŕavila krĕlova. „Ó, ano“, odvĕtil. „A neslyŝels moje prohlĕšení?“ „Slyŝel.“ „Proĉ tedy jsi ŝperk nepŕĭnesl ve třĕceti dnech?“ „Aby se neřeklo, ŝe vrĕtil jsem jej ze strachu pŕed trestem tvŕm a ne z ŭcty k bohu.“

(Nový Lid.)

<sup>1)</sup> varias, <sup>2)</sup> vidigas, <sup>3)</sup> neřikĕme primo, oktavo, <sup>4)</sup> Mácha-skolaj <sup>5)</sup> fotografilo, <sup>6)</sup> vojmarŝado.

*Kiom da novaj abonantoj vi varbis?*

## EL ĈĚĤOSLOVAKIO

*Se iu el tiuj ĉi koncizaj notoj speciale interesas iun el niaj eksterlandaj legantoj, la redakcio povas pŕi detalan informon.*

*Niajn eksterlandajn legantojn ni petas, ke ili traduku kaj publikigu la suprajn informojn en siaj naciaj gazetoj kaj sendu al ni almenaŭ unu ekzempleron de la gazeto. Al la artikoloj aldonu noton pŕi deveno. Ili helpos grave nian poresperantan propagandon.*

— *1025 domoj* estis dum 1925 konstruitaj en Praha kun 5280 loĝejoj. El ĉi tiuj 5280 estis la plejmulto — 3619 — unu- aŭ duĉambraj. Tri aŭ kvar ĉambrojn havis 1576 loĝejoj, pli ol kvar ĉambrojn sole 85 loĝejoj.

— *Fremdlandaj skoltoj* vizitis la urbon Praha dum la paskaj festotagoj, 128 el Anglio kaj Nederlando. Ilia rilato kun ĉeĥoslovakaj skoltoj konsistis plejparte el aŭfablaj ridetoj kaj demandaj rigardoj. La kelkaj ĉeĥoslovakaj skoltestroj sciantaj angle kompreneble ne sufiĉis por paroli kun ĉiuj gastoj. Tiel la karavano promenis muta kun la ĉeĥoslovakaj kamaradoj, kvankam certe estus multo reciproke rakontota. La skoltoj forgesas lerni ĝustatempe esperanton, por uzi ĝin dum tiaj okazoj. Kion signifas la internaciaj tendaroj, kiam en ili mankas interkompreno?

— *Nacia banko ĉeĥoslovaka* komencis sian agadon la 1-an de aprilo. Ĝi havas kapitalon de 12 milionoj usonaj dolaroj, dividitan en 120.000 akcioj, kies trionon posedas la ŝtato. La banko transprenis ĉiujn taskojn, kiujn havis ĝis tiam la Banka oficejo de la financa ministerio. Ĝia direktoro estas dro V. Pospíšil, membro de la Financa komitato de la Ligo de Nacioj.

— *126. 134 militaj invalidoj en Ĉeĥoslovakio* ricevis dum la pasinta jaro ŝtatan pension. Sume 514.500 militviktimoj estis dum tiu jaro subtenataj, el ili la supre dirita nombro de invalidoj, 100.023 vidvinoj, 204.201 orfoj. Blindiĝintaj soldatoj estis 597 en nia lando.

— *3045 cindriĝoj de mortintoj* okazis dum 1925 en la 7 kremaciejoj de Ĉeĥoslovakio. En Praha 1788, en Liberec (Reichenberg) 409, en Pardubice 320, en Most (Brŭx) 218, en Mor. Ostrava 206, en Nymburk 63 kaj en Ĉeské Budĕjovice 41.

— *Aviada Ligo de Masaryk* por popularigo de aviado en Ĉeĥoslovakio, fondita en marto 1926, havas nun, post unu monato, jam pli ol 100.000 membrojn.

— *Naftaj fontoj* en slovaka loko Gbely, la eta ĉeĥoslovaka naftoprovizejo, liveris dum la pasinta jaro 7300 tunojn da kruda nafto. 450 laboristoj estis tie okupitaj.

— *La dua radiostacio en ĈSR* estas filia stacio de Radiojournal en Brno, ĉefurbo de Moravio. Ĝi elsendas sur ondo 521 (KW 2'4), ĉefe inter la 19-21 horo. Komencante per majo, esperanta kurso estos tie disaŭdigata de S-ro Bednĕr, direktoro de komerca lernejo.

— *Radiumo troviĝas en ĈSR* apud Jáchymov en okcidenta Bohemio. En 1925 oni gajnis iom pli ol unu gramon. Entute de 1912 estis gajnitaj tie 12 gramoj da radiumo. La tutmonda provizo de radiumo estas 150 gramoj.

## BULTENO

ED ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 10.

APRILLO 1926.

### Mil membrojn bezonas ĈAE.

### Kial vi ne volas esti unu el la milo??

### Aliĝu el ĈAE senhezite.

Jara kotizo 16 Kč. Senpaga libra premio. ĈAE helpas al vi en via propagando. Pruntos ekspozician materialon. Havigos artikolojn por gazetoj de via loko. Sendos tekstojn de paroladoj. Donos ĉiuspecajn informojn pri la movado, konsilojn por klubofondo ktp.

### III. KONGRESO EN BRATISLAVA

la 1—2 Majo 1956.

Laŭ la informoj ricevataj de LKK en Bratislava la alvenantaj aliĝoj rajtigas la esperon, ke la nunjara manifestacio de la ĉeĥoslovaka esperantistaro estos vere impona.

Vi grave faciligas laboron de aranĝantoj, se vi al la kongresaj kunvenoj kaj similaj entreprenoj aliĝas tuj, ne en la lasta minuto.

Kongresa kotizo estas 15 Kč, aliĝilon sendas S-ro Herold Kesik, urba oficisto, Bratislava, Radnica, 93/a.

Programo kongresa troviĝas sur aliĝiloj; ĝi estis ankaŭ presita en nia 1-a n-ro, kun ŝanĝoj en la 2-a n-ro.

#### *Teatro-programo kongresa:*

Sabate, la 1-a Majo, precize je la 14-30 h. en la teatra halo de la ministerio (Vládna budova)

#### I. LAŬ NOVA LEĜO.

Komedio unuakta, esperantigita de Ruspa.

La ministro . . . S-ro Herold Kesik el Bratislava  
Lia edzino . . . E-ino Elsi Mahr el Bratislava  
La grafino . . . F-ino Alinjo Zigmundig el Pezinok  
La kuiristino . . . S-ino Roza Brychta el Chotěboř  
Miss Pipsi . . . F-ino M. Choquin el Lyon  
La sekretario . . . S-ro Mauro Bartha el Levice  
Gazetskribisto . . . S-ro Al. Diamant el Pezinok

#### II. LA RIBELANTAJ PUPOJ.

Knabina intima sceno de Johano Keršek, esp-igis E. Wanitsek.

Violo . . . . . F-ino Karola Klein  
Aranka . . . . . F-ino Lily Wendelin  
Grete . . . . . F-ino Marieto May  
Juliette . . . . . F-ino Ginjo Löwy  
Alice . . . . . F-ino Ella Reisner

La ludantinoj estas ĉiuj el Pezinok.

#### III. LA BLUA ĈAPELO.

Burleskaĵo unuakta, esperantigita de Rudolf Spalek.

D-ro Isid. Trompanto, advokato S-ro H. Kesik  
Malenjo, lia edzino . . . . . F-ino Ronjo Popper  
Modistino . . . . . F-ino Vilma Kovarik

La geludantoj estas ĉiuj el Bratislava.  
La teatraĵojn enstudigis kaj aranĝis H. Kesik.

#### *Utilaj informoj por kongresanoj*

Akceptejo ekfunkcias vendrede, la 30./4. je [la 15 horo, en la ĉefstacidoma atendejo de la II. klaso. Eniru el la perono. Ĉiu kongresano nepre vizitu ĝin. Montrinte sian kongreskarton, li ricevos la kongresan insignon, menditajn kuponojn pri loĝado, teatro ktp. La neanoncintoj venu tien ankaŭ, ili povas pagi la kongreskotizon tie.

En la akceptejo oni deĵoros sabate de la 5. ĝis la 10. horo matene. La poste alvenintoj iru en la Primasan palacon, tie en la teretaĝa kongresoficejo deĵoros la kassisto, S-ro Aleksandro Csáder.

En la stacidoma akceptejo deĵoros ankaŭ junularo, preta konduki la alvenintojn en la urbon.

Teatro prezentadon nepre vizitu, mendu la biletojn tuj aŭ en la akceptejo. La enirpago estas 10 Kč kaj 6 Kč, ĝi efektive valoras por la prezentado. Komenco precize je la 14-30 h. Atentu pri la horo, ĉar la malfruigintoj — laŭ la polica aranĝo — estos enlasitaj nur al la dua parto de la prezentado.

Vendon de esperantaj libroj la LKK komisiis al librovendistoj Hirschler kaj Weisz. Ilia stando estos antaŭ la kongresejo.

La kongresejo estas la spegulĉambro en la primasa palaco sur Primaciálné námestie.

Ekskursoj okazos dimanĉe posttagmeze, laŭ elekto de la partoprenantoj, al diversaj lokoj. Precipe rekomendindaj estas:

1. *Devin*, per ŝipo tien je la 14 h., reveno je la 18 h. Tre vidinda ruino de kastelo de Mojmír.

2. *Pezinok*. Per fervojo 30 min. Vigla esp. grupo, bona vino.

3. *Monumento de generalo Štefánik* apud Ivanka, fervoje 10 min., piede 1 horo.

4. *Svanzbach*. Popolaj kostumoj de malofta originaleco.

5. Promeno tra la *montara parko*. Proksima kaj belega. Kesik, sekr.

## FINANCOJ DE ĈAE EN 1925

## Konto de perdoj kaj gajnoj.

Koncize sen trairaj sumoj, laŭ la aprobata raporto de S-ro Fr. Novák, kasisto.

*Elspezoj:* Korespondisto, salajro Kč 1270.—, afranko (1375·10 kaj 313·05) Kč 1688·15, Bulteno 1-5 n-roj Kč 1500.—, cikulerroj (364·36 kaj 243·52) Kč 607·88, papero, poŝta ĉekkonto (301·50 kaj 166·03) Kč 467·53, donacoj kaj diversaj (114.—, 36.— kaj 7·60) Kč 157·60, Otavainen Kč 479·20, Eltranĉaja oficejo Kč 260.—, deficiito de la II. kongreso Kč 665·31, vojaĝaj elspezoj eksterlandaj Kč 1500.—, enlandaj Kč 914.—, kotizo al KR 1924, resto Kč 154.—, 1925/l. Kč 440.—, 10% senvalorigo de la inventaro Kč 118·40. Sumo de elspezoj Kč 10.222·07.

*Enspezoj:* Kotizoj Kč 10.038.— (1924 Kč 1147.—, 1925 Kč 7391.— plus 3 dumvivaj Kč 1500.—), subvencio ministeria Kč 1000.—, rentumo Kč 215·24, diversaj Kč 298·34 (profito ĉe vendado de presajoj, donacoj, diferenco de vojaĝo Ĉe, repaĝita afranko). Sumo de la enspezoj Kč 11.551·58.

La enspezoj estis do je Kč 1329·51 pli grandaj ol la elspezoj; tiu ĉi diferenco prezentas pligrandiĝon de la Asocia havaĵo dum 1925.

## Bilanca konto al 31./12. 1925.

*Aktivoj:* Kaso Kč 2·45, poŝta ĉekkonto Kč 539·65, konto ĉe Městská spořitelna Praha Kč 4210·82, stoko de presajoj Kč 579·84, inventaro Kč 1.065·20, ŝuldantoj Kč 176·40, prunto al la Progreso Kč 2000.—. Sumo de aktivoj Kč 8.574·36.

*Pasivoj:* Kotizoj por 1926 Kč 164, Kreditoroj: I. C. K. Genevo (vojaĝo Ĉe) Kč 130.

La diferenco inter aktivoj kaj pasivoj Kč 8280·36 estas havaĵo de ĈAE fine de 1925.

La diferenco inter tiu ĉi havaĵo kaj la la havaĵo Kč 6950·85, montrita por 31./12. 1924, estas Kč 1329·51. Ĝi respondas al la supre indikita kresko de la Asocia havaĵo.

## SCIENCA SEKCIO DE ĈAE.

Raporto sendita al la jarkunveno de ĈAE la 28. Februaro kaj tie danke aprobata.

La Sekcio ekfunkciis la 1. Aŭgusto 1925.

Ĝia unua tasko estis la zorgo pri realigo de la rezolucio de Pariza Scienca Konferenco pri esperantaj resumoj en sciencaj revuoj. En tiu senco ni skribis al la Reĝa ĉeĥa scienca societo kaj al la Ĉeĥa Akademio en Praha, kiuj ambaŭ estas eldo-

nantoj de Revue des travaux scientifiques tĥecoslovaques, kaj al tiuj membroj de nia Honora Komitato, kiuj estas profesoroj de altlernejoj. Sekve de tio evoluis grava kaj interesa korespondado, kiu ankoraŭ daŭras.

Samtempe ni skribis pri tio al 13 naciaj societoj esp. de malgrandaj nacioj petante, ke ili ankaŭ entreprenu la samon. Bedaŭrinde venis sole du respondoj (de la Dana kaj Hungara N. S.) kvankam ni refoje petis kaj publikis en Progreso alvokon.

Kun Internacia Scienca Asocio ni daŭre korespondas kaj laŭ ĝia instigo ni sendis leteron al la redakcio de aviada revuo Letectví.

Nia plia tasko estas varbado de membroj por ISA. La subskribinto estas ĝia reprezentanto por CSR.

Estis entute forsenditaj 81 leteroj.

D-ro Stan. Kamaryt,  
Direktoro de Scienca Sekcio.

## ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESP. EN 1926

## KOMITATO

1. Bergman Max, obchodník, Ústí n. Orł.
2. Bouška Hynek, Vršovice, Ĉelakovského 326
3. Eiselt Jos., vlád. rada, Vinohrady, Slezská 58
4. Hromada Rudolf, přednosta, Praha VII. Sochařská 333
5. Dr. Kamaryt Stan., profesor, Bratislava, Telocvičná 3
6. Keyzlarová Berta, choť obchodníka, Červený Kostelec, Sokolská 7
7. Kubala Alois, důlní úředník, Sl. Ostrava 1002
8. Kudela Ant., vrchní soudní oficiál, Olomouc, Horní novosadská 56
9. Novák Frant., majitel závodu hodinářského, Praha I., Malé nám. 10
10. Pitlík Aug., vrchní komisař min. obchodu, Praha II., Křemencová 17
11. Skleněčka Otto, účetní, Hradec Králové, Živnobanka
12. Schmidt Mil., ministerský rada min. financí, Vinohrady, U divadla 6.

## VICKOMITATANOJ

1. Dobeš Zdeněk, bankovní úředník, Praha II., V Jirchářích 14
2. Janoušek Jan, pojistný matematik Patrie, Vinohrady, Břetislavova 1975
3. Malík Adolf, úř. st. drah, Přerov, Kramářova 31
4. Ing. Novák Rudolf, šéf elektrárny města Plzně, Plzeň, Manesova 39
5. Scharfenbergerová Konstantina, úřed., Jaroměř, Klouzkov 119.

## KONTROLA KOMISIONO

La nomojn de la membroj de la Kontrola Komisiono ni publikigos en la venonta n-ro.

## MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Laŭ informoj ricevataj de Ĉs. Asocio Esp.

### NOVAJ KURSOJ

En **Prostějov** S-ro Heikenwälder gvidas kurson por 20 p., en ejo de Komerca akademio.

En **Brno-Královo Pole** S-ro Rud. Fridrich, direktoro de gimnazio, gvidas kurson por 32 gimnazianoj de la klaso Ib, laŭ lernolibro de Bednár.

En **Písek** kurson gvidis S-ro Fr. Pražák. Aliĝis 50 p., en la dua leciono pliaj 15, en la tria pliaj 20, entute 85 p. El ili ĝis la fino restis 45 p., notinda rezultato.

En **Motyčín** kurson por 20 p. gvidas S-ro Hájek.

En **Holešov** Prof. Růžička gvidas kurson por 25. p., lernolibro de Šupichová.

### PAROLADOJ

En **Motyčín** ap. Kladno F-ino Vlčková parolis la 14 Marto en Societo de metiista kaj komercista junularo. Ĉeestis 35 p.

### FOIRA PROPAGANDO

**Praha.** Dum la printempa foiro *ĈEI*, havigis esperantan standon, en pavilono de turismo. Ekspozician materialon liveris ankaŭ ĈAE, Progreso Marto kaj UEA. La E. Klubo Praha dediĉis propagandajn flugfoliojn por disdono. Ofereme deĵoris tie S-inoj Hofmanová kaj Dlouhá.

Alia esperanta stando estis aranĝita de Ing. Berger, en ĉefa palaco. Disdonataj estis propagandiloj eldonitaj de S-ro Berger kaj tiuj de la klubo.

### LOKAJ RAPORTOJ

**Holešov.** La klubo havas 10 m La januara jarkunveno elektis: Prof. Fr. Růžička, prez.; S-ro Václav Krajča, sekr.; S-ro J. Galeta, kas.; S-ro S. Vodňanský bibl.

**Prostějov.** La 20. Decembro la jarkunveno elektis: S-ro Ant. Tyl, prez.; F-ino M. Havránková viceprez.; la ceteraj komitatanoj estis reelektitaj.

**Praha.** E. Klubo elektis en sia jarkunveno la 19/3: S-ro Hromada prez.; S-ro Koutek viceprez.; S-ro R. Waldstein sekr.; S-ro Zd. Dobeš kas.; S-ro J. Janda bibl.

**Pízeň.** E. Klubo aranĝis sian jarkunvenon la 27/2. La nova komitato: Ing. R. Novák prez.; S-ro J. Pavlík vicepr.; S-ro K. Melichar sekr.; S-ro K. Prach kas.; S-ro J. Brožík bibl. — La klubo aranĝis la 27 Marto amikan vesperon de okcidentbohemiaj esp-istoj, en la kafejo de la urba teatro. Al sukceso helpis membroj de ĉiuj esp. kluboj en Pízeň.

**Trnava.** Samideanoj el Pezinok kunvokis interesantojn pri esp-o-kurso en Trnava en civitanau lernejoj, kie klarigis la 13./2. 1926 vespere al 22 partop. signifon kaj organizon de kurso s-roj dr. St. Kamaryt (slovake) kaj H. Kesik (germane). La intereso estis vigla, sed tamen ne anoncis sin la 20./2. sufiĉa nombro de partoprenontoj. Tial oni decidis prokrasti la kurson ĝis venonta aŭtuno. Ĝis tiam zorgos pri la esp-a afero s-ro Štefan Rayman, Trnava, Masarykova 17.

## Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

**Radioamatérské časopisy esperantské.** Mezinárodní svaz radioamatérů rozesílá první čísla svého oficiálního orgánu Internacia Radio-Revuo, psaného esperantem. Hlavním redaktorem jest slovuťný francouzský průkopník radiotelefonie dr. Corret a spolupracovatí budou odborníci ze všech zemí. List jest cenným obohacením literatury o radiu, přináší mnoho výborných článků pro úplné začátečníky i pro pokročilé konstruktéry. — Esperanto přichází do všeobecného používání mezi radioamatéry celého světa a již dávno byla pocitována potřeba odborného časopisu esperantského.

**Kongres brazilských esperantistů.** V Brazílii nabylo esperanto již dávno velkého rozšíření a sjezdy tamních esperantistů jsou vždy mohutnými manifestacemi pro mezinárodní jazyk, na nichž se účastní široké vrstvy obyvatelstva. Ve výboru letošního kongresu, jenž se bude konatí v městě Victoria v brazilském státě Espirito Santo od 9. do 12. května jsou členové brazilské vlády, která též ostatně morálně i materiálně podporuje veškeré podnikání esperantistů. Člen Brazilského esperantského svazu, který byl vyslán z Ria de Janeiro do místa příštího kongresu ku projednání přípravných prací, byl po celou dobu svého pobytu ve Victorii hostem s átu Espirito Santo. Oběžníky kongresu jsou opatřeny státním znakem brazilským a jsou rozesílány úředně všem obcím celé země. Veřejnou přednášku o významu esperanta bude mítí při kongresu člen brazilské Akademie prof. J. Medeiros e Albuquerque. Tamní arcibiskup bude sloužití pro účastníky sjezdu esperantsky mši a esperantsky bude kázati.

**Holandané pro esperanto.** Holandský královský ústav inženýrů se sídlem v Hágú přihlásil se za člena Esperantského vědeckého svazu a zaplatil na 20 let napřed svůj příspěvek. Svým zástupcem v tomto svazu jmenoval vrchního inženýra holandské telefonní společnosti Isbrückera.

**Francouzština nebo esperanto k informaci ciziny?** Ve Francii mají novou zábavu. Ve veřejnosti tam kolují chybné francouzské texty, které uveřejnily k informaci ciziny časopisy různých zemí. V poslední době si vzali v Paříži na mušku jeden československý list, jehož francouzské články se hemží chybami a nesmysly. Francouzi se vysmívají této francouzštině, jež často vůbec neví srozumitelná a protestují právem proti takovému hyzdění své mateřštiny. Žádají, aby svět přestal s komolením krásného, třebaže nesnadného francouzského jazyka a užíval mezinárodního esperanta, chce-li, aby mu bylo všude rozuměno. Dokonalé naučení esperantu je snazší než pochopení základů francouzštiny.

**Poštovní tiskopisy s esperantským nápisem.** Rusko, jež vydalo nedávno poštovní známky s esperantským textem a korespondenční lístek s tiskem v tomto jazyku, užívá nyní esperanta i na ostatních svých tiskopisech. Listky, jež byly vydány pro jednotlivé sovětské republiky s textem ukrajinským, běloruským, gruzinským tatarským a arménským, mají nápis v jazyku příslušné země a v esperantu.

**Jak švýcarské úřady podporují esperanto.** Poštovním úředníkům švýcarským, kteří skončí s úspěchem esperantský kurs, nahradí poštovní správa švýcarská celé zaplacené školné i peníze vydané za učebné pomůcky.



## PACIFISMO

La *Universala Esp-ista Pacifista Ligo*, kies centro estas en Hago, nomas en landoj kaj urboj landajn, respektive urbajn sekretariojn kun la ĉefa tasko, propagandi Esperanton inter la ekzistantaj pacifistaj kaj aliaj pacaj rondoj.

En Ĉeĥoslovakio akceptis la oficon de landa sekretario s-ro ing. B. Molnár (Praha II., Žitná 44) kaj ni petas tiujn, kiuj estas pretaj esti urbaj sekretarioj en sia urbo kaj plenumi serioze la programon de la Ligo, ke ili sendu sian aliĝon al nia landa sekretario.

La laboro farota ne estas malfacila. Oni provizore starigis jenan programon:

a) skribu aŭ vizitu pacajn societojn en via urbo kaj montru la utilon de Esperanto por la paco kaj petu ilin, ke ili invitu parolanton pri Esperanto al siaj kunvenoj,

b) proponu al la pacaj societoj, ke ili nomu apartan Esperanto-sekretarion,

c) faru ĉiun ceteran laboron, kiu povas akceli nian celon (paroladoj, artikoloj, kursoj por pacifistoj, partopreno en publikaj manifestacioj, gazetnotoj pri la movado kaj pacifismo ktp. . .)

*Administrado:*

La urbaj sekretarioj varbas anojn por la Ligo. La kotizon ni fiksas 4 Kč minimume, sed ni petas bonvolan pli altan kotizon de tiuj, kiuj povas pagi ĝin. — En difinita tempo, post alvoko, la urbaj sekretarioj sendos la raporton pri sia agado, la membroliston kaj depreninte proprajn elspezojn por la Ligo ankaŭ la kolektivajn kotizojn al la landa sekretario, kiu sendos ĉiujn raportojn kaj la monon al la centro.

*Karaj samideanoj!*

Ni eluzu la favorajn rezoluciojn el la pacaj kongresoj. Ni almenaŭ devas atenti la kontraŭlaboron de Idistoj, kiuj jam intervenis ĉe la Packongreso Parizo 1925, dank' al kelkaj ĉeestintaj Esperantistoj vane. Kaj ni ne devas malatenti aliajn gravajn movadojn, kiuj estas malfermitaj por nia laboro. La Paneŭropa movado fariĝas post intervenoj de la ĉefuloj en Ameriko nepre aktuala. Pri ĝi ni devas interesiĝi. En via urbo eble ekzistas filio de YMCA (YWCA), aŭ alia pactendenca societo. Vizitu ĝin kaj ekagu! Se mankas tia societo ĉe vi, fondu tian, eĉ se komence nur malgrandan rondon. La Paca Societo de Chelčický kun sia Esperantista Sekcio, aŭ aliaj societoj volonte disponigos paroladon aŭ parolonton por via kunveno. Ni mem estas nun ankoraŭ malfortaj en la komenco, sed ni povas interveni por vi kaj helpi vin, Skribu al ni! Nia minimuma kotizo ebligas, ke vi ankaŭ varbu multajn anojn! Ni esperas ricevi multajn aliĝojn de urbaj sekretarioj, same de simplaj anoj. Ekagu!

*Universala Esperantista Pacifista Ligo*  
Landa sekr. B. Molnár, Praha II., Žitná 44

**Opatříme Vám následující knihy:**

Fundamento eldono 5 lingva . . .	Kê 6-
Fundamento, kun ĉeĥa trad. . .	3-
Fundamenta Krestomatio . . .	20-
Fabeloj de Andersen . . .	12-
Georgo Dandin . . . . .	6-
Hamleto, Shakespeare, 170 str. . .	10-
Ifigenio, Goethe, 108 str. . . .	12-
Proverbaro esperanta, 82 str. . .	10-
Rabistoj, Schiller, 144 str. . . .	12-
Revizoro, Gogol, 100 str. . . .	12-
Rabeno de Baharah . . . . .	8-
Marta . . . . .	20-
Eliro, Levidojpo . . . . .	6-
Sentencoj de Salomono . . . . .	4-
Predikanto . . . . .	2-
Lingvaj respondoj . . . . .	10-
Faraono, Bol. Prus, 3 sv. 600 str. .	38-
Pola Antologio, krátké povídky . .	6-
Halka, opera, text . . . . .	4-
Interrompita kanto . . . . .	3-
Makbeto, Shakespeare . . . . .	8-
Mazepa, Slowacki, tr. Grabowski .	6-
Imenlago, novelo de Storm, 34 str. .	3-
Kaatje, el la flandra 111 str. . . .	8-
Fatala ŝuldo, teosofický román 318 str. . . . .	10-
Reĝo Judea . . . . .	18-
Monadologio de Leibniz 31 str. . .	2-
Vortfarado, de Ĉefeĉ . . . . .	4-
Vortaro de oficialaj radikoj de Cart, 32 str. . . . .	1-50
Klasika libro de esp-o, 120 p. . . .	5-
Bulgara lando . . . . .	12-
Bulgara Antologio . . . . .	30-
Kataluna Antologio . . . . .	70-
Rakontoj de Arbes, 135 str. . . .	6-
R. U. R. Ĉapek . . . . .	13-
Ĉeĥa literaturo. Dr. Novák Arne . .	8-
Vade-Mecum de Int. Farmacie, Rousseau, 228 p. . . . .	24-
La Esperantisto en Germanio . . . .	20-
Moravia karsto . . . . .	5-
Tittl: Vortaro esp. ĉeĥa váz. . . .	7-
Kühnl-Procházka: Slovník ĉesko-esp. . . . .	18-
Čánský-Riedl: Slovník esp.- ĉeský . . . . .	20-
Kabe: Enciklopedia vortaro, 175, váz. .	18-
Boirac: Plena vortaro esp. 3 sv. . .	38-
Wüster: Maŝinfaka vortaro . . . .	15-
Bednář: Učebnice esperanta . . . .	12-
Kamaryt: Jazyk mezinárodní . . . .	8-
Ĵotzin: Na obranu esperanta . . . .	3-
Šupichová: Učebnice esp. . . . .	9'60
" Kniha konversace . . . . .	9'60
" Legu kaj parolu . . . . .	16-
Žďárský: Učebnice esp. . . . .	20-
Bouška: Škola esperanta, úplná . .	30-

Obstaráme za předem zaslaný obnos.  
Žádejte složenku.

**LA PROGRESO, Praha VII., Sochařská 333.**